

Geografia nomenklature, 10-a parto
La sufikso -i ne egalas al la sufikso -uj
Claude Gacond, 291-a radioprelego, 1969.05.07 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia nomenklature.

A.- La pasintan semajnon ni vidis, ke la sufikso **i** ne estas sinonimo de la sufikso **uj**. La ekvacio **i** egalas **uj** estas falsa kaj trompa.

Cl.- Antaŭ ol kompari la **i**- kaj **uj**-sistemojn, ni redonas la difinon, kiun ni proponis, por la sufikso **i** :

A.- **i**.- Sufikso signifanta : teritorio, lando, regno, tero, mondo karakterizata de la radiko : Amazono – Amazonio ; italo – Italio ; aŭstrala – Aŭstralio ; Tunizo – Tunizio, patro – patrio, esperanto – Esperantio.

Cl.- Devas sekvi noto :

A.- Ni ne devas forgesi, ke la sufikso **uj**, kun sia konkreta signifo de **entenilo**, **ujo** estas ligita kun ideologio de gento kaj eĉ de raso. La sufikso **i** havas nenian similan signifon. **i** ne estas egala al **uj**. Francujo signifas « ujo por la francoj », Francio signifas « la teritorio, lando karakterizata de la francoj. » En la konstruoj Francio, Amazonio, patrio la radikoj **franc**, **Amazon** kaj **patr** estas uzataj kiel ĉefa karakterizilo.

Cl.- Ni vidis, ke en la **uj**-sistemo formoj kiel **Kanadujo**, **Amazonujo**, **Aŭstralujo**, **patrujo** estas idiotismoj, pro la entenila signifo de la sufikso **uj**. En la **i**-sistemo formoj kiel Kanadio, Amazonio, Aŭstralio, patrio estas logikaj. Ili havas la signifon : Kanada lando, Amazona teritorio, aŭstralia tero, patra tero.

A.- Venis nun la momento kompari ambaŭ sistemojn **uj** kaj **i** por bone kompreni iliajn diferencojn.

Cl.- La **uj**-sistemo povas formi landnomon el la loĝant-, gent- aŭ ras-radikoj. El la loĝant-nomoj abiseno, afgano, albano, andaluzo, anglo, akvitano, arabo, armeno, aŭstro oni povas formi la landnomojn Abisenujo, Afganujo, Albanujo, Andaluzujo, Anglujo, Akvitanujo, Arabujo, Armenujo, Aŭstrujo, tio por resti ĉe la litero **a** de la vortaro.

A.- Tiuj nomoj fakte signifas : **Ujoj por la abisenoj, afganoj, albanoj**, kaj tiel plu.

Cl.- La **i**-sistemo ankaŭ povas formi landnomon el tiuj loĝantoj: Abisenio, Afganio, Albanio, Andaluzio, Anglio, Akvitanio, Arabio, Armenio, Aŭstrio.

A.- Tiuj nomoj ne plu signifas : Ujoj por, sed teritorioj, landoj karakterizataj de la abisenoj, afganoj, albanoj, kaj tiel plu.

Cl.- En la komenco de esperanto la sufikso **uj** estis uzata de Zamenhof en formoj, kiuj iom post iom montriĝis idiotismoj : Holandujo, Brazilujo. Restas la formoj patrujo kaj Esperantujo, kiuj estas ankoraŭ uzataj.

A.- Ili fakte signifas « ujo de aŭ por la patro, de aŭ por esperanto. » Fakte ni troviĝas antaŭ idiotismoj. Nenia logika analizo bazita sur la esperanta vortfarado kapablas konduki al la signifoj patrolando kaj esperantista mondo. Tiujn signifojn oni devas lerni. Do fakte patrujo kaj Esperantujo ne estas deriveblaj el patro kaj esperanto. **Patrujo** kaj **Esperantujo** devus troviĝi en la vortaro, ĉar la sufikso **uj** ne estas kiel la sufikso **um** sufikso sen difinita senco uzata por derivi vortojn, kies rilato al la radiko estas malpreciza kaj ne esprimebla per alia sufikso.

Geografia nomenklature, 10-a parto
La sufikso -i ne egalas al la sufikso -uj
Claude Gacond, 291-a radioprelego, 1969.05.07 & 10

Cl.- Kontraŭe tiu sufikso **uj** povas esti profite anstataŭata de la sufikso **i**, kaj ni ricevas logikajn kaj analizeblajn formojn : patrio, Esperantio.

A.- Tiuj nomoj signifas la teroj karakterizatajn de la patro, de esperanto, aŭ la patrolando, esperanto-mondo.

Cl.- Se vi estas kontraŭ la formoj patrio kaj Esperantio por tiuj nocioj, kaj se vi volas eviti la idiotismajn formojn patrujo kaj Esperantujo, vi havas la eblajn konstruojn patrolando, esperantolando, esperantistujo, esperantomondo, kiuj estas konformaj al la esperanta derivado.

A.- Tiuj du ekzemploj montras, ke kiam la **uj**-sufikso volas formi landnomojn el radikoj, kiuj ne signas nocion pri popolo, gento, raso, oni alvenas al idiotismoj. Esperanto estas lingvo, kiu ne digestas la idiotismojn, eĉ se ili estas zamenhofaj kiel **patrujo** kaj eble **Esperantujo**. Pro tio tiuj du substantivoj kaŭzas en nia lingvo reagojn, kiuj estas normalaj.

Cl.- Kontraŭe la **i**-sufikso povas formi nomojn de landoj kaj teritorioj el plej diversaj radikoj. Tion ĵus pruvis la radikoj patro kaj esperanto. Tion pruvas la formoj Amazonio, el la nomo de la rivero Amazono, Aŭstralio el la adjektivo aŭstrala, kiu signifas suda, Tunizio el la urbo Tunizo. La pasintan semajnon ni vidis, ke formoj kiel olivio kaj marmotio estas eblaj por signi la teritorion, kie kreskas olivarboj kaj vivas marmotoj. Ni vidis, ke la formoj Kaŭkazio, Balkanio povas signi la regionojn, kie etendiĝas la kaŭkaza montaro, la balkana duoninsulo. Ni vidis, ke la vorto Atlantikio povus respondi al la nocio atlantika mondo.

A.- Por tiuj formoj, kiuj estas neeblaj en la **uj**-sistemo, la loĝanto estas derivata per la sufikso **an**. Ni obtenas formojn kiel : alĝeriano, amazoniano, aŭstraliano. Sed tio ne signifas, ke en la **i**-sistemo, la loĝantoj de Francio, Ĉinio, Italio estas francianoj, ĉinianoj kaj italianoj, kiel provas aserti la vortaro de Albault-Léger kaj eĉ Gaston Waringhien en la studo *La landnoma demando*. Nur kredo, ke la sufikso **i** estas egala al la sufikso **uj** kondukis ilin al tiuj falsaj konkludoj. Se la teritorio karakterizata de la francoj, ĉinoj kaj italoj estas Francio, Ĉinio kaj Italio, la loĝantoj normale estas francoj, ĉinoj kaj italoj.

Cl.- Sennaciistoj emas kelkfoje distingi inter loĝantoj de Francio, kiuj apartenas aŭ ne apartenas al la gento franca. Tiam ili uzas la nuancoplenajn formojn franco kaj franciano. Tiuj nuancoj estas necesaj, nur kiam la landnomo estas derivata de gentnomo. En ambaŭ sistemoj ili povas esti utilaj.

A.- Ĉe radikoj kiel Afriko, Alabamo, Alasko, Alzaco, Ameriko, Andoro, Angolo, Anĵuo, Anamo, Aragono, Argentino, Arizono, Arkansaso, Artezo, Aŭvernio, Azio, Azerbajĝano la sufikso ne estas necesa, ĉar la radiko mem jam difinas teritorion. Tamen kelkaj esperantistoj emas aldoni la sufikson **i**. Ili obtenas ekzemple la formon Argentinio, kiu ne estas idiotismo, sed nura pleonasmo. Ĝi signifas Argentinlando. Ni lasu al ili tiun plezuron trouzi la sufikson **i**, kiu estas multe malpli danĝera, ol la plezuro trouzi la sufikson **uj**.

Cl.- Ambaŭ sistemoj havas siajn kvalitojn. Ambaŭ havas sian lingvan koloron. Dum la **i**-sistemo vekas nur geografiajn konsiderojn, la **uj**-sistemo vekas ideologiajn konsiderojn.

A.- La venontan semajnon ni tuŝos tiun temon. Vi eble miros pri kelkaj el niaj diroj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-